

ĈEHOSLOVAKA  
ESPERANTO  
REVUO

JARO XIII. NRO 9-10.  
DECEMBRA N-RO  
APERIS 30. I. 1932.

# LA PROGRESO



OFICIALA ORGANO DE ĈEHOSLOVAKA ASOCIO ESPERANTISTA  
REDAKCIO KAJ ADMINISTRACIO: PRAHA-VII. SOCHAŔSKÁ 333

Jarabono (10 numeroj) Kĉ 20.—; fremdlando Kĉ 25.— (aŭ 4 sv. fr.) Escepto: Aŭstrio, Jugoslavio, Pol-  
lando kaj landoj de Stockholma interkosento: 3 sv. fr. Konto de Poŝta Sparkaso Praha: N-ro 34.271.

## DANKESPRIMO

### AL LA ĈEHOSLOVAKAJ GESAMIDEANOJ

Iom post noktomezo mi subite ve-  
kiĝis en mia kupeo en la vagonaro de  
Koŝice al Bratislava. Mi ĵus havis tre  
belan sonĝon — mi dancis Ĉardaŝon kaj  
valson kun belaj virinoj en same belaj  
slovakaj kostumoj. Mi ĵus revidis antaŭ  
miaj okuloj tiun slovakon belulinon, kiu  
la antaŭan tagon respondis mian de-  
mandon: „dobre?“ (ĉu bone?“) per la  
vortoj: „Ano — all right!“

Sed finiĝis tiu meznokta sonĝo. Mi  
rigardas el la vagonara fenestro kaj  
vidas alian sonĝan bildon. Norde staras  
mistere la pintoj de Tatry — sed  
sen „sa blýska“. La plenluno lumigas  
la blankan neĝon sur la krutaĵoj kaj sur  
la paŝtejoj ĉirkaŭ Štrba. La ĉielo estas  
blugrizniĝra. Nur malmultaj steloj bri-  
las. Abietoj staras en grupoj kaj izole.  
Sed ĉiam denove miaj okuloj direktiĝas  
al la kronoj de Tatry, kiuj staras pira-  
mide, senmove, silente, kiel tuta vico  
da Matterhornoj. Vere mistera bildo!  
Estas kvazaŭ mi starus en valo sur la  
luno kaj rigardus al surluna montoĉeno.  
Ĉu mi eble ankoraŭ sonĝis? Tute ne! La  
malvarma montara aero de la novem-  
brofino efikis sur mia dormema vizaĝo.  
Estis ekster dubo: Tiu nokta aperaĵo  
de la lunlumigata Tatry estis realaĵo,  
senfine bela, mirinda, rava — kaj reva.  
Longe mi rigardis. Sed fine la vagonaro  
ŝanĝis la direkton kaj for estis la dua  
sonĝa aperaĵo.

Sekvis tria sonĝo. Mi pensis, ke mi

tuj skribos dankleteron al la afablaj  
ĝesamideanoj en Ĉehoslovakujo. Mi  
serĉis paperon kaj krajonon. Mi faris  
bonan komencon. Mi sukcese raportis  
pri la slovakaj belulinoj kaj la Ĉardaŝ,  
kaj pri Tatry. Sed sen kraĵono daŭriĝis  
la tria sonĝo. Matene la tuta malneto  
estis preta — en mia kapo. La kraĵono  
kuŝis sur la planko. Tro laca mi estis  
por kontraŭbatali la dormemon. Sed ne  
ĝravis. En mia tria sonĝo mi retravivis  
ĉiujn detalaĵojn de mia vojaĝo tra la  
bela Ĉehoslovakujo, kaj ĉiujn afablecojn  
de la gastamaj ĝesamideanoj.

Urboj kiel A ŝ, M a r i á n s k é L á z n ě,  
Plzeň aperis. Mi vidis la afablajn  
ĝesamideanojn, kiuj bonvenigis min ĉe  
la stacidomoj. En Plzeň terure griza kaj  
monotona mateno; sed rozoj kaj diantoĵ  
el la manoj de s-ino Ulčová en same  
kolororiĉa Plzeň-a konstumo ĝajigis ne  
sole min, sed ŝajne ankaŭ la 25 ĝesa-  
mideanojn, kiuj venis al la stacidomo.  
Kiom da karaj nomoj estas ligataj kun  
la nomo de Plzeň! Kaj kun Plzeňský  
Prazdroj!

Kaj Praha! Denove la patrineto  
Praha akceptis min — la trian fojon.  
Sed ĉi foje mi ne venis por fotografi la  
cent turojn. Tro multan laboron mi  
havis. Paroladoj kaj propagando kiel en  
ĉiuj aliaj urboj. Finfine mi renkontiĝis  
kun la agema sro Ginz, kiu plej modele  
kaj kun multa peno organizos mian  
ĉehan paroladvojaĝon. Bedaŭrinde unu

solan vesperon mi povis resti en Praha. Tro malmulta tempo por eĉ sole saluti miajn multajn malnovajn amikojn kaj por interkonatiĝi kun tuta aro da plej fervoraj gesamideanoj.

En Vrchlabí neĝegis kaj estis neeble iri al Špindlerův mlýn, sed f-ino Tham havis tiom por rakonti al mi; ne sufiĉus tuta semajno. Feliĉe en Liberec la suno brilis, kaj multaj gesamideanoj faris dimanĉan ekskurson kune kun mi sur la pinton de Ještěd. Marianne faris heroan batalon kontraŭ Franz el Jablonec. Nur kiam ni alvenis ĉe la pinto 1010 m alta ili faris pacon, la reĝino kun la fabrikanto de verdaj steloj. La elvido estis ja tro bela por batali. Salutis en la distanco Sněžka. S-ro Prof. Scholze same bonege organizis mian paroladan vojaĝon tra la germana parto.

Venis feliĉaj kaj plej agrablaj horoj en Litoměřice kaj Teplice-Šanov. Ankaŭ tie plej helpemaj kaj kapablaj kaj multaj ĉarmaj gesamideanoj!

Kaj denove Praha! S-ino Herzigová gastigis min plej komforte en sia hejmece loĝejo. Sed mi kovris la plankojn, tapiŝojn kaj liton de mia ĉambrego per amaso da paperaĵoj. Dum kvar tagoj mi faris heroan batalon, sed perdis ĝin. Miaj paperaĵoj preskaŭ sufokigis min tage kaj nokte. Mi estis kontenta, ke almenaŭ la tagojn mi havis liberaj. Mi rivelis 1500 negativojn de Polujo, Finnlando, Svedujo, Norveĝujo kaj Germanujo. S-ino Herzigová preparis por mi matenmanĝon kaj tagmanĝon kaj foriris labori. Je la tria ŝi venis hejmen kaj trovis la matenmanĝon kaj la tagmanĝon ankoraŭ sur la tablo. Mi simple forgesis interrompi mian laboron. Vizitoj al s-ro Hromada — kiu nun espereble jam estas sana. Paroladoj publikaj kaj internaj, kiel en ĉiuj aliaj urboj. Mirinda tradukanto estis s-ro Echtner.

Survoje al Klado mi estis akompanata de Vuk Echtner kaj lia edzino. Mi devis lerni korekte elparoli „Tonjčka.“ Bela nomo, sed pli facile estas elparoli „Sunradieto.“ Ankaŭ pli trafa nomo. S-ro Kreibich kaj multaj aliaj gastigis, salutis kaj fotografis min. F-ino Vlčková venis al la gastejo malsana

por revidi min. Ŝi kondukis min tra Praha, post la Nürnbergga kongreso.

Denove Plzeň kaj venis Mladá Boleslav kaj Mnichovo Hradiště. Ĉie nur la plej agrablaj spertoj. En Hradec Králové mi admiris la modelan ordon en la oficejo de la UEA-ĉefdelegito s-ro Sklenčka. Ne sole la edzino, sed ankaŭ Eva bele babilis en esperanto.

Salto al Breslau — sed por unu sola nokto. Tuj mi revenis al ĈSR kaj la postan vesperon mi jam parolis en Brno. Venis Prostějov kaj Olomouc. Se nur mi povus permesi al mi skribi ĉiujn nomojn de la afablaj gesamideanoj en tiun ĉi leteron. Sed ili restu certigataj, ke ili estas skribataj per oraj literoj en mia koro. Ĉiutage mi bedaŭris, ke mi ne povis resti unu plian tagon. Ĉiam forkuri de novaj amikoj. Sajnas, ke s-ro Ginz kaj ICK interkonsentis, ke mi restu nenie sufiĉe longe por pli profunde rigardi en la okulojn de ĉarma knabino. Sajnas, ke ili nepre volas, ke mi reiru al Usono kiel fraŭlo. Ĝojoj kaj malĝojoj de oficiala esperantisto. Ĉie fervoraj samideanoj ĉirkaŭ mi, kvazaŭ Policanĝeloj. Mi ne scias, ĉu ili volis protekti min aŭ ĉu ili volis zorgi, ke mi ne forrabu lokan samideaninon al Usono. La respektivaj gesamideanoj komprenas.

Plej interesis min, kiel s-ro Neužil instruas siajn ĝelernantojn. Sed same mirinde estas, kiel s-ro Kudela sukcesis instrui esperanton al sia kvar-jara nevo Luĉjo. Gramatike korektan kaj plej ĉarmeblan esperanton admiris esperantistoj kaj ne-esperantistoj. Kaj s-ro Mastný, ne faru tro grandan konkurencon al Baťa.

En Mor. Ostrava — rekordo! Ses paroladojn en altlernejoj kaj publikaj. En unu tago kvar paroladojn, entute 7½ paroladhoroj. Bonega laboro!

En Český Těšín, krom la publika parolado granda amika kunveno de 43 gesamideanoj el 14 lokoj, eĉ el Bielsko (Polujo) kaj Záblatí (ambaŭ 35 km).

Košice — granda salto! Rigardu la landkarton! Sovaĝa montaro!? Ankaŭ mi tiel pensis. Sed granda eraro! Jam ĉe la stacidomo 10 gesamideanoj gvi-

J. S. MACHAR:

## KLASIKA BELULINO

Per korpo blanka kaj gracia  
 Favana sorto dotis ŝin;  
 Heleno estis nomo ŝia,  
 Ŝi — vera tipo de grekin'.

Vi vane serĉus kuraĝulon  
 Kapablan sen skrupul' aŭ hont  
 Rigardi rekte en okulon  
 Ŝin, la severan, ĉe renkont'.

Eĉ nura pens', ke povus oni  
 Al ŝia sensopira kor'  
 Altrudi sin kaj kison doni,  
 Jam ŝajnis esti malhonor'.

Ŝi apartenis al la speco  
 De mirindaĵoj de l' natur',  
 Sub kies alta majesteco  
 Ni mute ĝenufleksas nur.

Ŝi el marmoro ŝajnis esti;  
 Ĉu do — mi pensis fojojn cent —  
 En ŝi sin povus manifesti  
 Almenaŭ unu homa sent'?

Sed kiam unu senton tamen  
 Ĉe ŝi mi trovis, pro dolor'  
 Ekĝemis mi kaj diris: „Amen“ —  
 Respekto flugis tute for:

En vintro foje je vespero  
 La dia belulin' Helen'  
 Ĵus antaŭ „Carmen“, la opero,  
 Kolbasojn manĝis tri kun kren' . . .

El la ĉefo tradukis Miloš Lukáš.

dataj de s-ro Friedrich. Interesa urbo.  
 Kvar paroladoj. Rekordo — 750 personoj unufoje kaj duan fojon 550. (ne okazis en la historio de Košice, ke kunvenis pli ol 300 personoj en paroladejo). Eĉ radio - parolado — sen manuskripto. Kia miraklo! S-ro Friedrich faris ĝin. Vizito al Myslava - kaj jam mi fotografas senfine slovakajn konstumojn kaj dancas kun belulinoj. Sed pri tio mi jam raportis en la komenco.

Bratislava — la lasta urbo en mia vojaĝo. D-ro Kamaryt, Prof. Jukl, Familio Kővari . . . . Sed mi devas fini. Mi vidas ruĝan krajonegon en la nervozaj manoj de la redaktoroj de „Marto“ kaj „La Progreso“. Sed tamen. Mi devas aldoni la statistikon:

40 paroladoj — en 4 semajnoj!  
 30 publikaj, 1 Radio 9 internaj.  
 Veturis per 31 trajnoj & 44 aŭtomobiloj.  
 Vojaĝis 75 horojn vagonare.  
 Vizitis 19 lokojn, sed faris nur 5 urbvizitojn.  
 Vizitis 15 redakciojn, kontaktis kun.  
 39 UEA delegitoj kaj 25 kluboj.  
 Ĉeestis pli ol 8000 personoj ĉe

la publikaj paroladoj.

Jen mia publiko raporto. Tute ne detala, sed mankas loko. Tamen, karaj redaktoroj, bonvolu ankoraŭ permesi, ke mi danku al ĉiuj miaj multaj centoj da samideanaj ĝeamikoj, kiuj helpis por ke mia vojaĝo estu granda sukceso, treege agrabla kaj neforgeseble bela. Ili bonvolu akcepti tiun publikan dankon, ĉar estas ja neeble skribi al ĉiuj aparte. Kaj se al iu mi ne dankis sufiĉe kore, mi petas lian pardonon kaj indulgon, ĉar ne okazis intence — aŭ eble la vagonaro tro rapide ekveturis.

Kaj por fini mi deziras al ĉiuj samideanaj ĝeamikoj en la ĈSR plej ĝojan Kristnaskon kaj feliĉan Novan Jaron. Mi esperas ke vi ne forgesos min tro rapide. En mia koro vi ĉiuj kaj la novembro 1931 vivos eterne.

Joseph R. Scherer,  
 Speciala Delegito de la I. C. K.

Vieno, 27. Nov. 1931.

ALOIS JIRÁSEK:

## FILOZOFOJ.

Solece en kampoj apud arbareto staras jam multe pli ol cent jarojn malnova remparo de militkampa baterio, duone ruiniĝinta kaj surkreskita de arbustaro. Sola ĝi restis ĉi tie el ĉiuj remparoj kaj ŝtaltaĵoj, kiuj en longa zono sin tiris tra la ebenaĵo, kaŝante multnombrajn kanonojn prusajn, direktitajn kontraŭ la imperiestra armeo, same protektata per remparoj. Nun ĝi similas al praepoka tumulo kaj sur ĝi, dum nebulaj matenoj kaj malvarmaj vesperiĝoj, paŝtistoj preparas al si fajron kaj kante vokas en la malproksimon.

En 1778 dum la milito pro la bavara heredaĵo, la tuta regiono apud la riveroj Metuje kaj supra Labe, vizitita de du armeoj, similis al vastega formikejo. En la frunto de la prusa armeo staris reĝo Frederiko, kontraŭ li imperiestro Jozefo, ambaŭ filozofoj. Densa nebulo metis sin sur la pejzaĝon kiel profunda lago; estis frumatene, silente, surde, kvazaŭ neniu soldato estus proksime. Nenie estis permesite sonori; sed anstataŭ sonorilo eksonis kanto de vira voĉo: „Kiu la protekton de l'Plej Alta —

La kanton ekaŭdis Vác'av Suk, simpla soldato de la imperiestra regimento de Hiller, garde staranta malproksime antaŭe, sur la rando de herboriĉa neprofunda vaĵeto. Densa arbustaro duone lin kaŝis. Pro la malvarmo li suprentiris mantelon ĝis la tripinta ĉapelo tiel, ke lia harligeto ne estis videbla. Jen tiu ĉi kanto — kaj kvazaŭ ĝuste kontraŭe! Tie estas jam la malamiko — kiel do eble?

Suk pli ŝatis iun profanan kanton kun kamaradoj apud la fajro aŭ antaŭ la tendo de kantinistino, sed tiun ĉi fojon la pia kanto kortuŝis lin. Lia avino hejme kantis ĝin ja de la ĉambro al la kamero, de la kamero al la subtegmento, kiam ŝi, klaketante per pantofloj, vekis la tutan domon.

Suk ekkantis ankaŭ. La voĉo kontraŭa ĉesis por momento, poste ree eksonis, kaj sur ondoj de la malrapide leviganta nebulo sin portis la malnovtempa kanto.

Sed Václav ne eltenis longe; la scivolemo ne permesis al li. Tiu, malantaŭ

la vaĵeto, kantis plue kvazaŭ en preĝejo, kaj ŝajnis, ke li volas finkanti la versojn, kiel faris la avino de Suk.

„Hej, vi tie, ĉu vi estas soldato?“

Per tio Suk komencis interparoli kaj li ne parolis en surdan nebulon. Li sciigis, ke li parolas al soldato, al prusa gardostaranto.

„Kaj kiel do, vi estas Pruso, kaj parolas ĉefe?“

„Mi estas Ĉeĥo, el Kladsko apud la bohemia landlimo. Mi servas laŭ la volo de Dio jam la duan jaron —“

„Dia li estas,“ pensis Suk. „Sendube luterano,“ kaj diris sian konjekton laŭte. La pruso jesis

„Kaj kiel vi estas nomata?“

„Jan Koláčný.“

„Sed jen, ni ĉi tie interparolas — kion niaj estroj —?“

„Ĉu ni faras ion malbonan?“

„Ni estas ja samnacinoj, ambaŭ Ĉeĥoj. Ĉu iam okazas io simila al ĉi tio?“

La dialogo interrompiĝis. Suk vidis tra la maldensiĝanta nebulo la konturon de la prusa soldato kun pinta ĉako, simila al la episkopa ĉapo. Li staris ĉe malnova branĉoriĉa fago. Post nelonge Suk rekomencis: „Sed estas malvarme hodiaŭ!“

„Estas. Venu plivarmiĝi!“ Kaj Koláčný tion diris tiel sincere, kvazaŭ li starus sur la sojlo de sia neĝovalita kabano montara.

„Kien?“

„Ĉi tien, al mi, mi havas plenan botelon —“

Suk ekhezitis. Malfido vekiĝis. Ruzo ia — kaj krome, foriri el la posteno al li destinita! Koláčný ekkomprenis lin.

„Ne timu, amiko! Ĉu mi povus malutili al vi? Ni formetu la armilojn kaj ni iru ĉiu duonon da vojo!“ — Tiu ĉi voĉo ne estis trompa kaj Suk vidis, ke Koláčný apogas la pafilon al la arbo. Li ekrigardis returnen kaj iris. Duonvoje renkontiĝis la ambaŭ soldatoj. La prusa malamiko proponis la manon kun ne ŝajniĝita sincereco.

„Venu do kaj ne timu, neniu el ni faris ja ion malbonan al la alia, ni estas fratoj de la sama sango! Ĉu tuŝas nin, kion faris kontraŭ si la regnestroj?“ diris la luterano, legemulo, posteulo de la bohemiaj elmigrintoj; kaj

la gaja knabo el la reĝolando komprenis lin.

Kaj kiel la du ĉi tie rezonis, tiel certe rezonis antaŭ ili multaj kaj multaj rezonos ĉiam, estu la reĝoj filozofoj aŭ la filozofoj reĝoj.

„Kaj ĉi tie ĝi finiĝis,“ aldonis la maljuna vilaĝano, kiu rakontis al mi laŭ malnovaj memoroj tiun ĉi historion, kaj mansignis al la ruiniĝinta remparo, sur kiu ni ripozis. — „La du filozofoj profundigis en la interparoladon, kaj tiel oni trovis ilin. Ĉi tie sidis la prusa reĝo, kaj tien ĉi oni alkondukis Koláčný por la juĝo. Li diris ĉion, kaj post momento oni lin tie malantaŭ la remparo mortpafis. La alia saviĝis ja de plumbo kaj pulvo, sed kuris tra la „sanga spaliro“ kaj dio scias, kie li trasuferis la ceteran punon!“

Efektive, ĉu valoras la armeo, kiu filozofas kaj rezonas?

El la ĉeĥa: Jiří Svoboda.

## NENIO NOVA SUB LA SUNO EN ESPERANTUJO.

Ni prave ĝojis pri la sukcesoj lastatempe atingitaj en la speciala kampo de . . . gramofono.

La voĉon de nia mortinta Majstro povas nun ĉiu aŭdi havigante la diskon antaŭ kelkaj monatoj fabrikitan laŭ cilindro malnova. Ni estas dankaj al la hispana samideano, kiu antaŭ jaroj kaptis per primitiva fonografo la voĉon de Zamenhof kaj disponigis nun sian trezoron la al samideanaro tutmonda.

Dum februaro nunjara ne estis eble ludigi gramofone nian himnon, kiam ni deziris tion fari dum speciala okazin-taĵo. Ne ekzistis tia disko tiutempe. Preskaŭ kvardeko da infanoj, membroj de la fama Bakule-horo, anstataŭis ti-am brile la diskon. Sed kelkajn semajnojn poste tiu disko jam estis surkanfita de la samaj infanoj. Kaj preskaŭ samtempe aperis dua disko kun „Espero“ orkestre ludita.

Ĝojigaj progresoj!

Ni rigardu tamen iom pli atente ĉirkaŭ ni. Unue laŭtempe, poste ankaŭ en senco geografia.

Pasis jam longa tempo, sed okazis, ke la granda kompanio pariza Gaumont

engravuris ankaŭ en vaksan cilindron fonografan la karajn parolojn zamenhofajn, verŝajne en pli perfekta maniero ol povis tion fari nia hispana amiko amatoro. Tiu cilindro ekzistis, sed ĉu ĝi estas retrovebla?

Kaj la „Espero“ sur gramofona disko? Eĉ ĝi ne estas novaĵo. Niaj kunlaborantoj japanaj antaŭiris Eŭropon. La libroj Kanija en Tokio jam antaŭ kelkaj jaroj eldonis gramofonan diskon, sur kiu kantis solistino japana la „Esperon“ kaj la „Tagiĝon“. La okcidentaj samideanoj multe ĝojus, se ili povus aŭdi la ŝatatajn kantojn kun orienta ĉarmo kantitajn de amikino japana. Sed la disko jam longe estas disvendita.

O. G.

## KELKAJ PENSEROJ EL „NOVÝ LID.“

Gardu Vin mem pro viaj infanoj; la vivon, kian vi postulos de ili, komencu jam nun vi mem!

Neniu estas libera, kiu sklavece submetiĝas al la korpaj ĝuoj.

Ne kredu ĉion, kion vi aŭdas pri la aliaj, ne parolu tion pluen kaj diru al vi: Kiu scias, ĉu ĝi estas vera kaj se jes, ĉu ĝi koncernas min?

La progreso estas efektivigado de utopioj. Ĉiujn malbonojn de la nuntempo oni povas kuntiri en unu: Egoismo. Memoru, ke vi nenion alportis en la mondon kaj nenion forportos de tie ĉi; via havaĵo estas havaĵo de la nacio, de la homaro.

Ne estu parazito! Vivi je la kosto de la aliaj estas la plej malbona malsano de la homaro. Se vi havas ian havaĵon, des pli grandaj estas viaj devoj, ju pli multe da ĝi vi havas; kiom pli multe da senmova kapitalo vi havas, tiom malpli multe havas la aliaj.

Nenion ni faru, kion la konscienco malaprobas kaj kion ni ne povus fari antaŭ la okuloj de ĉiuj; ni ne parolu kio ne konformiĝas kun la vero; tiel ni plenumos la taskon de nia vivo.

Ĉeĥa proverbo: La fiero faras militon, la milito malriĉecon, la malriĉeco humilecon, la humileco pacon, la paco riĉecon, la riĉeco fieron; Evidu la fieron!

M. Gorkij: La grado de la kulturo dependas ĉiam de la amo al laboro.

Goethe: Klopodu esti vere tia, kia vi volas esti konsiderata.

R. Tagore: La fluo de la vero fluas tra la fluejo de eraroj.

Tradukis Bož. Vlčeková.

Ĉi kio estas la interno de la terglobo? Ĝis nelonge obstine vivotenis sin la teorio, ke la terglobo havas oran kernon, ĉar en sia centro ĝi estas plej peza. Tiu ĉi teorio estas nun fine forĵetita. Dro L. Adams el la geofizika instituto de Carnegie skribas pri tio jene: Nia terglobo konsistas preskaŭ ekskluzive el kvar elementoj: fero, magnezio, silicio kaj oksigeno. De la 88 ceteraj elementoj ekzistas relative eta kvanto kaj ili troviĝas sur relative granda tavolo surfaca. Eĉ oro ne faras escepton, nek arĝento aŭ platino. Senpere sub la surfaca tavolo, konsistanta el sedimentaj rokaĵoj, estas granita tavolo proksimume 15 km dika. Sub ĝi troviĝas 30 km-a tavolo da rokaĵoj bazaltaj. Poste jam sekvas 3000 km dika tavolo de olivino kaj plue la plej potenca tavolo el pura fero (kun eta almikso de nikelo). Tiu ĉi tavolo havas 6000 km diametre. Kiel estis eble solvi la misteron de la kapturaj abismoj teraj, kiuj neniam estos enireblaj de la homo? La ŝlosilon por solvi ĉi tiun liveris la scienco pri la tertremo. La tertremo nome kaŭzas elastajn ondojn, el kiuj unuj disvastiĝas tra surfacaj tertavoloj, aliaj siavice tra pli profundaj tavoloj en la tero. Laŭ tio, el kio konsistas la tavoloj frairataj, la moviĝo de la ondoj pli aŭ malpli rapidiĝas per certa maniero, respondanta al la elasteco de la trapenetrataj rokaĵoj kaj mineraloj. Laŭ tio estis eble ĉi veni sufiĉe certe la konsiston de la tuta interno de la terglobo.\*)

Kial ni ĉesas kreski. La biologio instruas, ke el ĉiu ĉelo estiĝas du novaj, el tiuj ĉi kvar, el kvar ok, kaj per la sinsekva dividado la organismo kreskas. Kial tiu ĉi dividado ne progresas senfine, kial la homo ne ĝiskreskas je ĝiganto, kial la muso ne ĝiskreskas la grandecan de la elefanto? La sekreto de la kresko estas en tio, ke la naturo konservas harmonion de ĉiu viva estaĵo. La harmonio de estaĵo estas dote donata al ĉiu sana organismo. Regule la kresko ĉesas tiam, kiam la organismo fariĝis sekse matura; tiam la lokon de la kresko okupas la reproduktiĝado; sekve de tio la reproduktiĝado estas nenio alia ol plua kreskado, kies rezulto estas nova estaĵo.

La pentristo Zrzavý ŝatas aŭskulti aferojn nekredablajn. Foje li sidis kun sia kolego en kafejo kaj la kolego rakontis al li pri ĉio, kion la angla scienca ekspedicio trovis, kiam ĝi malfermis la tombon de Tutenhamon. La pen-

tristo estis ĉiam pli kaj pli ravita, tiel ke lia kolego mem sentis, ke li devas fini per io absolute miregiga. Li do finas sian rakonton: „Sed la plej stranga ĉe tio estis, ke en la tombo, post tiom da jarcentoj, brulis ankoraŭ lumo.“ — „Kiel do,“ surpriziĝis la pentristo, „tio ja ne estas ebla...“ „Kial ne,“ diras la kolego, „tio estis eterna lampeto!“ — „Ha, tiel,“ diras Zrzavý, „en tiu okazo jes.“

V kursech, které chystáte, použijete... Svým známým k domácímu učení doporučujete....

UČEBNÍCI A CVIČEBNÍCI  
MEZINÁRODNÍHO JAZYKA

ESPERANTO

OD PROF. DRA ANT. ŠILHY

96 stran. — Cena Kč 10.60 s portem.  
Při odběru aspoň 5 výtisků sleva.

Vydalo La Progreso, Praha VII.

Učebnice.

Dr. A. Šilha: Učebnice esperanta. Schválena min. školství. Bohatá souvislou četbou, vhodnou pro otázky a odpovědi	10.60
H. K. Bouška: Škola esperanta. Obsáhlá, hojně příkladů a jazyk, pojednání	31.—
Žďárský — Procházka: Učebnice esperanta	21.—
J. Bednář: Esperanto	13.—
H. K. Bouška: Krátký kurs esperanta	—60
Zamenhof — Škaryn: Slovenská učebnice esperanta	10.60

\*) Silico — křemík; tavolo — vrstva; rokaĵo sedimenta — hornina usazená; granito — žula; rokaĵo bazalta — hornina čedičová.

## EL ESPERANTA MONDO.

### Propra Internacia Hejmo Esperantista en Aspremont (Alpes Marit.) Francujo.

La Direktoro de la I. C. K. en Genevo sciigas al ni la jenon: „Post kiam la formalaj detaloj kun la aŭtoritatoj ktp. estas ordigitaj, ni povas sciigi oficiale, ke la movado nun posedas sian unuan internacian hejmon esperantistan en Aspremont (Alpes Maritimes) en Sudfrancujo, 13 km de Nico. Ĝi konsistas el domo kun 9 ĉambroj instalitaj (kun simpla komforto) kaj tereno da 30.569 kv. metroj. Ĝia celo estas, ebligi al ripozemaj samideanoj kaj turistoj esperantistaj libertempan restadon dum kiu ajn sezono de l'jaro je moderaj kostoj. Ĉar la loko estas limigita, estas necese anonci sin sufiĉe frue. Detaloj estas sciigataj per anoncoj kaj informoj en la Esperanto-gazetaro. Gvidantoj de la Hejmo estas Gesinjoroj E. E. Yelland el Londono.

Detalajn informojn pri la restado oni ricevas kontraŭ 1 respondkupono de „Internacia Hejmo Esperantista“ (Nia Civito), Aspremont (Alpes Marit.) Francujo.

La entrepreno, kiu estas propraĵo de la movado, estas administrata sub la aŭspicio de la I. C. K.

### La Internacia Sciencia Asocio

Ĝus publikigis broŝuron entenantan la **Sciencan Fundamenton**, aperintan laŭ sinsekvaj partoj en ĝia Bulteno dum la lastaj monatoj.

Tiu 100-paĝa broŝuro enhavas tekston, kiu prezentas elementan didaktikan resumon de la matematikaj, fizikaj kaj naturaj sciencoj, kun laŭalfabeta tabelo de la vortoj.

Pro ilia malgranda nombro (nur 100), la samideanoj, kiuj deziras aĉeti tiun verkon, ne prokrastu mendi ĝin ĉe S-ro Rousseau 2, rue Alfred de Vigny, Béconles - Bruyères (Seine) France, sendante samtempe la prezon, t. e. 1 dolaron, aŭ samvaloran sumon.

\* \* \*

(Universalaj kongresoj) **Pernombre** ni ne kapablas impresi la aliajn, ĉar delonge oni spertis, ke la esperantistoj pli malfacile kunvenas ol ĉiuj aliaj fakaj societanoj. Amara konstato: mankoj de organiza disciplino kaj amo al ideo... At ĉu la ekonomia krizo estas tiom malbonefika, ke ĝi malebligis la partoprenon de multaj fervoruloj? Ni akceptu tiun ĉi kaŭzon... sed en Wien kunvenis pli ol 40.000 laboristoj por fari sian Olimpiadon... Aŭ, ĉu

multaj komencis prepari sin por viziti Parizon? (Oomoto Inf. 57.)

\* \* \*

Laŭ la statistiko de D-ro Dietterle, Leipzig, ekzistas en la mondo 6262 **instruistoj**-esperantistoj en 61 landoj. Esperanto estas instruata en 926 lernejoj en 38 landoj.

Hermann Haefker, aŭtoro de la verko „Jar-miloj pasas“ ricevis de la saksa **reĝistaro premion** de 1.000 markoj (8.000 Kč) por siaj meritoj pri la literaturo.

Antaŭ la mikrofono de la Radio-stacio Lyon-la-Doua kvin diverslingvaj esp-istoj recitis strofon el poemo de Zamenhof, kun la celo, ke la aŭskultantoj divenu la naciekon. Sole la nacieco de du recitantoj estis devenita.

Post kurso por **policistoj** estas nun en Tallinn gvidata kurso por **tramistoj**; ambaŭ kursojn subtenis la urbestro.

La **Krakovan kongreson** aliĝis entute 777 personoj (partoprenis 700) el tiuj ĉi landoj: Brita 85, Ĉeĥoslovaka 63, Sveda 53, Germana 50, Nederlanda 28, Aŭstria 22, Itala 18, Franca 18, Danzig 17, Hungara 15, Latva 14, Bulgara 10, Estona 8, Japana 8, Dana 7, Norvega 6, U. S. A. 6, Svisa 4, Finna 4, Belĝa 3, Jugoslava 3, Rumania 3, Alĝerio 2, Hispana 1, Saar-Teritorio 1, entute 449 personoj eksterlandaj kaj 328 Poloj.

La kurso, kiun S-ro Cseh gvidis en Krakovo antaŭ la kongreso, okazis laŭ oficiala invito de la urbestro. Partoprenis ĝin 270 personoj el 17 landoj. Certe neniu internacia kurso, precipe pedagogia havis tiom da partoprenantoj. La urbestro invitis la kursanojn al posttagmanĝo en la arbaro Wolski, disponiginte al ili urbajn aŭtobusojn. Tie la prezidanto de la urbo kolonelo Belina-Pražmowski salutis la gastojn en esperanto.

La nombro de **UEA-anoj en Polujo** kreskis de 379 membroj (1. IX. 1930) al 432 membroj (1. IX. 1931).

**Pola ministerio** de eksterlandaj aferoj decidis aĉeti provizore 100 ekz. de la pola nro de Literatura Mondo por propagandaj celoj.

**Literatura Monda** aperigis sian 9-an n-ro (Oktoebro 1931) kiu enhavas i. n. La senore'a homo (Zoltán Ambrus — Karlo Bodó). — Anĝla

Fraŭlino (S-ino Newell, London). — La nova Tao (Pan Loti, Sydney). — Poemoj: Amindaĵ junaj amikinoj, de Nikolao Hovorka. — Triopa trista gard' . . . de Ludoviko Totsche. — Trans la fabelocean' de Fr. Szilágyi. — Poemoj, de Hilda Dresen. — Plie: Kinoangulo de Jean Forge-Fethke. — Mia angulo de Julio Baghy. Observejo. Diskuto pri elparolado (Paul Nylén, Dr. Kalocsay). — Reproduktaĵo de bildoj. — La antaŭa nro enhavis recenzon pri la libro de Jan Welzl: Tridek jarojn en la Ora Nordo, de Lud. Totsche.

La lerte gvidata gazeto, kun granda nombro de kunlaborantoj, donas veran ĝuon al la ŝafanto de bela literaturo, prezentita en eleganta esperanto-vesto. En 1931 aperas 12 nroj (8 simplaj, du duoblaj) por 60 Kĉ. Pagebla ankaŭ ponumere (6 Kĉ).

Eterna bukedo estas granda verko de K. Kalocsay, kun tradukoj de la plej famaj poemoj el 20 lingvoj. El la ĉefo: Vrchlický. 352 paĝoj, duonledo, 80 Kĉ.

En Rivista Italiana di Esperanto Dro Kalocsay publikigas tradukon de la *Infero de Dante Alighieri*. En la oktobra nro aperas la unua kanto.

The Socialist Christian (Septembro) presigas anglan tradukon de F. Hughes: „One of the Four“ el „Dancu Marionetoj“ de Julio Baghy.

S-ro J. Merchant verkis novan libron „Kompaktinda Klem“, kiu aperis en Londono.

La libro de Dro Privat „La vivo de Zamenhof“ aperos en angla traduko, farita de Ralph. El:off.

Brita Asocio kolektas kapitalon 50.000 ŝilingoj. Ĝis fino de Oktobro 1931 kolektiĝis 20.682 ŝ. (cca 150.000 Kĉ).

La eldonejo „Verlag für Kulturforschung“ Wien — Berlin — Leipzig presigas en sia 3. volumo de praktika enciklopedio „Leksikono de la vivo“ detalan kurson de E., kiu ampleksas 24 grandformatajn, dukolore presitajn paĝojn riĉe ilustritajn kaj estas redaktita de D-ro Emil Pfeffer.

La konvinko, ke por sukcesa laboro estas necesa koncentriĝo de ĉiuj labor-fortoj estas predikata ne sole de nia Asocio. Ankaŭ la Aŭstria Esperanto-Asocio en sia kunveno la 28. 6. en Salzburg alvokas al aŭstriaĵ esperantistoj“:

„La samideanoj kaj grupoj nepre disciplinigu kaj ne faru iajn agojn ekster la societo aŭ faka laboro, loka aŭ faka funkciado sen scio kaj konsento de la teritoria organizo resp. de A. Esp. Asocio“.

En Hispana parlamento estas tri socialistaj deputitoj - aktivaj esperantistoj: Profesoro Rodrigo Almandaj arkitekto Francisco Azorin kaj ĵurnalisto Cayetano Redondo.

Nederlandaj kaj aŭstriaĵ fervojistoj havas permeson porti esperanto-insignon dum deĵoro.

La nomon *Strato de Zamenhof* donis la urbestro de Amiens (Francujo) al unu nova strato.

„La maljuna arbo“ de Masaryk en traduko de Milly Witz publikigis „Marto“, organo de GEL kaj nun reprenis „Flandra Esperantisto“ en sia oktobra numero.

En Instytut Administracyjno-Gospodarczy (mezgrada lernejo por ŝtataj oficistoj ĉe administracio, poŝto, fervojo) en Kraków okazas dum 1931-2 deviga instruado de esperanto.

La stenografio oficejo de la hungara parlamento dissendis al kolegaj oficejoj de ĉiuj parlamentoj esperantan cirkuleron pri diversaj aferoj de sia fako. Ni sekvas la aferon ĉe la parlamento en Praha.

La bela gvidlibro: *Milano kaj Lagoj de Lombardio* estas disvendita. — Kiel 2. volumo aperos libro pri Romo, kun multaj planoj, geografiaj kartoĵoj, historiaj, lingvistikaj kaj art-historiaj rimarkoj.

Gvidlibron pri Parizo, similan kiel la supre nomitaj, oni planas eldoni antaŭ la kongreso de Parizo.

S-ro Scherer finis sian vojaĝon en ĈSR per parolado en Bratislava la 23. XI. En Aŭstrio li parolis ĝis 30. XI., poste en Hungario ĝis 9. XII., en Bulgario ĝis 25. XII., en Jugoslavio ĝis 3. I. Lia programo en Eŭropo finiĝis la 4. I. 1932 per parolado en Milano.

Unua esperanto-lektorato en Anglujo estis inaŭgurita la 10. X. 1931 en universitato de Liverpool. La necesan sumon testamentis por tio D-ro Buchanan. Tial la oficiala nomo: „The John Buchanan Esperanto Lectureship“. Lektoro estas prof. Collinson.

El 19 Radio-stacioj eŭropaj okazis 23 sendoj en esperanto dum semajno de 8.—15. Novembro, laŭ la Esperanto-Radio-Programo, starigita de la Internacia Radio-Servo, komisiita de I. C. K.

En Aspremont, 13 km de Nice, troviĝas Konstanta Hejmo Esperantista, kie plena pensiono kun 3 manĝoj tage kostas ĉ. 40 Kĉ.

Pri la nuna situacio en Ĉinujo oni povas informiĝi el la Orienta-Gazet-Servo, ciklostilita bulteno eldonata de la Komitato por Internaciaj Rilatoj (Nanking, Mao-tan Street, Nro 5) en esperanto.

---

*Prihlásil jste se do Svazu?*

---



## OFICIALA JARLIBRO

de la Esperanto-Movado por ĵaro 1931 montras denove lertecon de la redaktanto, kiu scias enmeti en la tradician formon de tiu ĉi jarlibro ĉiun jaron ion novan kaj interesan. La lasta volumo enhavis multajn informojn pri la movado tre bone kaj uzeble aranĝitajn. Nun-jara volumo enhavas post kelk-jara paŭzo ree enciklopedietan parton kun informoj kaj tabeloj interesaj speciale laŭ vidmaniero de la internaciisto, de homo tendencanta al prijuĝo de la aferoj laŭ internacia vidmaniero. La leganto trovos kompilaĵojn, kiujn li ne ĉiam facile trovos aliloke. Precipe mi ŝatis trovi la informojn tre klarajn pri la Young-plano, Ligo de Nacioj kaj pri la Lingvaj malplimulto. En tiu ĉi artikolo mi ŝatus, se ĝi redonus la paragrafojn de la kontraktoj pri protekto pli precize, ne tiom ĝenerale, ĉar tiuj kontraktoj kreis efektive novan veran juron minoritatan, kun ĉiuj atributoj de formala juro; estas neprecize diri, ke koncernaj kontraktoj protektas sole lingvajn minoritatojn, ĉar ili ankaŭ protektas minoritatojn religiajn kaj rasajn; rilatante tion mi pensus, ke utilis atentigo, ke la grandpotencoj ne akceptis tian protekton de siaj minoritatoj; simile utilis, se oni per kelkaj vortoj estus atentiginta pri malfacileco difini ideon de minoritato, kiun malfacilecon plej akre karakterizas demando, ĉu angloj estas minoritato en Unuiĝita reĝlando de Granda Britujo. Ankaŭ la tabeloj pri Lingvoj en Eŭropo estas tre legindaj. Al mi efikas ridinde, se estas enmetata lingvo „morava“; estas instrua ekzemplo, kiom longe vivas artefaritaj nocioj; lingvo morava estis kreita de scienculoj disponigintaj sian kapablon al tendenco de iama registaro de estinta Aŭstrio, kiu celis pligravigi la germanlingvan procenton en tiama Aŭstrio per troa akcentado de multeco kaj pro tio malgrand-nombreco de la slavaj „dialektoj“. El la sama tendenco estiĝis ankaŭ troa akcentado de diverseco inter la ĉeĥa kaj slovaka lingvoj. Al nuna politika stato respondus ankaŭ alia aranĝo pri Ĉeĥoslovakujo: slovaka lingvo ne povas aparteni al minoritataj lingvoj en nia ŝtato, ĉar ĝi estas same oficiala en la tuta ŝtata teritorio kiel la ĉeĥa. Tial ĝi devas sekvi en koncerna alineo antaŭ la germana, kvankam la nombro estas malpli granda, kaj la fina sumo devas esti minus la 2200 miloj, ĉar ĝi laŭ indiko signifas sumon de la minoritataj lingvoj. Mirigas min la fakto, ke la aŭtoro uzanta sen plua ekspliko nomon serbo-kroata lingvo evitas terminon ĉeĥoslovaka (lingvo), kvankam diferencoj inter serba kaj kroata

estas almenaŭ tiom gravaj, kiom inter la ĉeĥa kaj slovaka. Ankaŭ estas nekonskvenco laŭ terminologia vidmaniero nomi en Sovetio ukraina tiun saman lingvon, kiun li nomas en Ĉeĥoslovakio rutena. Tiuj ĉi miaj rimarkoj neniel volas aserti, ke la kompilinto ne laboris honeste aŭ ke li mem volas propagandi ian teorion politikan, sed ili volas montri, kiom malfacile estas en tiaj sinoptikaj tabeloj doni precizajn kaj tute fidindajn informojn. Por doni pri tio ekzemplon el tute alia lando mi rimarkigu, ke laŭ libroj, kiujn mi legis (ankaŭ tre modernaj) estas sumo de svedlingvaj Finlandanoj 40%, ne 10% de la tuta finlanda loĝantaro, kiel asertas la tabelo. — La leganto vidas, kiom interese estas legi atente diverstemajn artikolojn de la enciklopedia parto. Mi aldonu por tiu, kiu tiun ĉi jaron ankoraŭ nepagis UEA kotizon, ke krom la menciitaj ekzistas pluraj aliaj artikoloj, eble lia scivolemo igos lin trovi la delegiton por repaĝi al li. Kaj ni finu per laŭdo de la komerca delegitino en Brno, kiu ankaŭ tiun ĉi jaron sukcesis kolekti rekordan nombron de enoncoj kaj entreprenoj. S. K.

**Eldona Societo Esperanto, Stockholm, Svedujo**, eldonis novan serion de ses fotografaj poŝtkartoj el Stockholm kun sveda kaj esperanta teksto. La kartoj prezentas: Reĝa kastelo, Parlamenta domo, Urbdomo, Koncerta domo, Reĝa drama teatro, kaj la Strato Kungsgatan. La prezo estas po 0.15 sved. kr. (Kĉ 1.40).


**LINGVA FAKO**


**PĚREKLAD 30. TEXTU.**

Překlad k 30. textu zaslali: Esperantista Klubo Kladno, Baculík Ján Zvolenská Slatina, Böhm K. Čakovice, Douba Arn. Tanvald, Dušátko K. Sázava, Hladký Jar. Karvinná, Hofmanová Marta Praha, Hřebíček, Jos. Doňní Kralovice, Machala T. Pržno, V. Pražák Kosmonosy, Pytloun Frant. Bakov, Rosypal Val. Háj, Vl. Slaný Vítkovice, Šlechta Pavel Smolenice, Štěpán Al. Hostivář, celkem 15 členů. Z nejlepších prací vylosovali jsme překlad Esp. Klubu na Kladně, kterému zašleme knižní odměnu. —

**Kiel laboris Edison.**

Malgraŭ1) sia alta aĝo Edison laboris ankoraŭ en siaj lastaj jaroj eĉ 18 horojn tage. Kiam li celis solvi iun problemon,3) li ne konis

ripozon. Sian tufan cerbon<sup>4</sup>) li koncentrigis sole al sia problemo kaj ne cedis, ĝis li solvis ĝin.<sup>5</sup>) Multaj kiuj estis ĉirkaŭ li, sciis ke li postulas de ili ofte neeblecojn<sup>6</sup>). Kiam lin kaptis febro labori aŭ febro fini iun aferon, li forgesis pri dormo kaj manĝo<sup>7</sup>). Sole lia edzino povis kaj sciis interveni en tiuj periodoj de la senfortiganta<sup>8</sup>) laboro.

### Poznamky.

1) Pĝes svuj vĝk: malgraŭ sia aĝo, spite sia aĝo. Dle SAT-vortaro: Malgraŭ znamená „simplan kontraŭecon“; „spite“ znamená vĝdy „in, tencon kaj obstinan kontraŭstaron“. Zde nikoliv „frans“, které znamená „pĝes“ ve smĝru místnĝm nebo smĝrovĝm na pĝ.: hoditi nĝco pĝes zed: ĝeti ion trans la muron.

2) pracovati aĝ 18 hodin = pracovati dokonce i 18 hodin = laborj eĝ 18 horojn.

3) kdyĝ ŝlo o rozĝešení = kiam temis pri solvo, kiam la celo estis solvi . . . ; jedná se o tuto vĝc = temas pri la jena afero = la celo estas la jena afero; oĝ ŝlo ve schŭzi? = pri kio traktis la kunveno?

4) Nĝkteĝi se rozpakovali uĝiti slova „cerbo“ a opisovali: menso, intelegto, pensokapablo. I v esperantu lze místo toho vĝeho řici „cerbo“.

5) Nepovolil, dokud nerozĝešil = li ne cedis, ĝis li solvis = li ne cedis antaŭ la solvo = antaŭ ol li solvis, ne cedis dum la tempo, en kiu la solvo ne estis preta.

6) nikoliv neeblecojn.

7) zapomĝnal na spĝnek a jĝdlo: li forgesis dormi kaj manĝi.

8) tĝĝ: elĝerpanta laboro, laciganta, laciga.  
Hm.

### NĝCO PRO SAMOUKY A KURSY.

Z mnoha stran dostali jsme proĝevy uspokojeni nad touto novou rubrikou, jeĝ přichází velmi vhod tĝm, kteří probrali nĝkterou uĝebnici a chtějí si své znalosti prohloubiti na praktickĝch příkladech. Budeme v tĝchto textech pokračovati i v novĝm roĝniku a v nĝm tĝĝ uveĝejnĝme slĝbený příklad konversace. Upozorĝujeme vĝak, že ĝim více pĝekladŭ od ŭčastnĝkŭ dostaneme, tím lépe budeme moci zjistiti event. chyby a neporozumĝní a naše výklady podle toho zařiditi. Proto nespokojte se s pĝeloženĝm, nýbrĝ zašlete svuj pĝeklad nám, nejlépe na korespondenĝním listku.

### Nia kurso.

Nia kurso okazas en la lernejo. Se ni volas veni en nian lernoĝambon, ni eniras tra la

granda pordo de la lernejo en la koridoron. Ni supreniras la ŝtuparon, ni venas en la unuan etaĝon. Tie tuj apud la ŝtuparo en la duan etaĝon (tĝĝ: al la dua etaĝo, tentokrate bez -n, pĝonevadĝ pĝedloĝka „al“ má jĝĝ sama o sobĝe smysl „smĝru“), estas nia lernoĝambro. En ĝi povas ŝidi sepdek personoj, se ni kalkulas kvin personojn por ĝiu el la dekkvar benkoj. Ni metas nĝajn kajerojn sur la benkon. La instruisto (la kursestro) korektas la taskojn, kiujn ni hejme skribis, kaj ekzamenas la lernantojn (la kursanojn.)

Li povas ankaŭ diri al iu el ni: Venu ĝi tien sur la podion kaj skribu sur la tabulon (zde mohlo by být tĝĝ „sur la tabulo“; piĝte kde?), kion mi diktos. Kion farus la lernanto aŭ la lernantino (la kursano aŭ la kursanino?) Li elirus el la benko kaj irus antaŭ la benkojn, sur la podion. La kursestro diktus kaj la kursano skribus. Se li bone lernis, li skribos ĝion bone. Kiam li finis, li revenos en sian benkon.

### LABOROJ DE ĈS. ESPERANTISTOJ.

Ĝádame ĝsl. esperantisty, ĝleny Svazu, aby nás laskavĝ informovali o svĝch pracĝch, jeĝ vyĝly tĝskem, zejmĝna v zahraniĝi. Budeme informace ty otiskovati pro pamĝt budouĝch a pro pĝiklad souĝasnĝm samiceánŭm.

### Pan Louda M., Praha.

1. V knize Ĉeská roĝenka (vychází v Plzni, obsahuje 608 str.) v roĝ. 1929, vyšel ode mne ĝlánek „Esperanto, Pomocný mezinárodní jazyk“. ĝlánek jeĝ umístĝn v rubrice Vĝda a umĝní, zauĝmá 7 stran Ĉ. Roĝenky. 2. V japon. esp. mĝsíĝ. Oomoto v ĝís. 55 debatní ĝlánek jako odpovĝď na ĝlánek Fritze Nahmy z Ĉes. Budĝjovic v ĝís. 50 Oomoto. 3. V Oomotu ĝ. 60, infor. ĝlánek o Mistru Janu Husovĝ, Komenskĝm, Chelĝickĝm a pres. Masarykovĝ. 4. V Oomotu v ĝís. 54, původní esp. báseĝ „La Mobilizacio“. 5. V knize verĝŭ „Sinjoro Laŭdata“ (nákladem Oomota) esp. báseĝ s tĝt. „Ex oriente Lux“. El I. C. K.

Rádce ĝeskĝho esperantisty je broĝurka odb. ŭĝitelky Julie Ťupichovĝ, která vĝs i vĝše znĝmé pouĝí formou otĝzek i odpovĝďí o vzniku esp., jeho orgĝnizaci, literatuĝe, uĝebnĝch pomŭckách, praktickĝm upotĝbenĝm, dopisovĝní a j. Objednejte bianco-sloĝenkou za 2.30 Kĝ u Julie Ťupichovĝ Praha, ĝ. ŭĝtu 16.879.

Tabelo de enhavo (4 paĝoj) estas aldonita al la 1-a n-ro. Vidu p. 112: Redakcia.

# BULTENO

DE ĈEĤOSLOVAKA ASOCIO ESPERANTISTA, PRAHA VII. SOCHAŔSKÁ 333.

NUMERO 41. - DECEMBRO 1931-II.

## LA 7. KOMITATA KUNVENO DE ĈAE

okazis marde la 15. Decembro 1931 en Praha, kafejo Louvre. Ĉeestis s-roj Ginz, Herzigová, Hromada, Janda, Dr. Pitlík, Sedláček, Slavík, Staněk, Sustr, F-ino Tarantíková, Votrubec. Prezidis D-ro Pitlík, protokolis F-ino Tarantíková. Daŭro de 20.30 ĝis 24-a horo.

El la protokolo ni citas:

### Komuna afiŝo propaganda.

Ni havigis al ni oferton por preso de afiŝoj propagandaj, kiuj prezentas terglobon, kvin-pintan stelon, kaj havas tekston „Esperanto — pomocná řeč mezinárodní.“ Grandaj afiŝoj kostos Kč 1.50, malgrandaj Kč 1.20. La detalojn ni sendos al kluboj en speciala cirkulero.

### Membraro.

Laŭ informo de nia kasisto venis 316 kotizoj dum 1931. El tio 213 por 1931, la ceteraj por jaroj pasintaj. Ĉar jam pli frue estis pagitaj 117 kotizoj por 1931, la sumo de la membroj pagintaj por 1931 estas 330.

### Vojaĝo Scherer.

S-ro Scherer faris en ĈSR entute 30 publikajn paroladojn, el kiuj 18 organizis ĈAE. La kunveno sincere dankas al S-ro Ginz por lia sindona kaj sukcesa laboro.

### Ĉiuj kluboj

ricevis cirkulecon kun speciala kopio de la artikolo de D-ro Kamaryt en Bulteno, paĝo 81: „Ĉtenáři čti...“ kun peto varbi por ĈAE inter siaj membroj.

### Neŭtrala Centro.

La komitato de ĈAE informas:

„La tiel nomata „Neŭtrala Centro de Esperanto en Praha“ estas privata entrepreno de sinjoro Robert Bloch, Praha-Smíchov. Ni klopodis, ke s-ro Bloch ĉesu uzadi la nomon „Neŭtrala“ kaj „Centro“, ĉar tio povus erarigi la neinformitan publikon esperantistan kaj neesperantistan kaj vekti opinionon, ke temas pri tia efektiva centra organizaĵo de ĉsl. esperantistoj. Ni bedaŭras, ke S-ro Bloch anstataŭ

sekvi nian inviton por kunlaboro, preferis labori apartigite sub tia erariga firmo.“

Por eviti miskomprenon pri tiu ĉi deklaro ni aldonas: Nek la komitato de Esperantoklubo de Praha, nek la komitato de ĈAE volas malhelpi, ke S-ro X. aŭ Y. laboru. Aserti la malon estus tro naiva, ĉar ĉiuj ja scias, ke nia movado bezonas personojn, kiuj volas labori. Ni invitis S-ron Bloch, ke li laboru kune kun ni, proponante al li la deziratajn funkciojn. Tion li rifuzas. Ni petis lin, ke li almenaŭ ne uzu la nomon „Centro.“ Ankaŭ tion li rifuzis.

Restas al ni nenio alia ol defendi la organizan ordon, kiun ni opinias necesa por sukcesa kaj serioze pripensita laboro. Se ni konsentas, ke S-ro Bloch rajtas nomi sin „Neŭtrala Centro“ ni devas konsenti la saman rajton al iu ajn samideano en iu ajn loko de la respubliko. Prezentu al vi la kaoson kaj la malbonon, kiu rezultus, se iu alia samideano en Praha skribus al esperantistoj kaj al ministerioj nomante sin „Centro“ kaj se same farus samideano ekzemple en Hradec kaj Brno kaj Bratislava.

Ni havas jam sufiĉe da oficialaj centroj kaj ne deziras aldoni al ili ankoraŭ ian specon de centroj privataj.

### Ministerio de fervojoj

elĉonos baldaŭ serion da poŝtkartoj kun ilustraĵoj de popolaj kostumoj de suda Moravio, pentritaj de la pentristo Ottmar. Nia vicprezidanto prizorgis la esperantan tradukon de la teksto.

### Generala sekretario.

En sia letero de la 26. Oktobro 1931 S-ro Hromada rezignis je sia funkcio de la ĝenerala sekretario de ĈAE. La komitato en sia kunveno la 23. Novembro ne akceptis la rezignacion kaj per letero petis nuligi ĝin. S-ro Hromada tamen insistas, ĉar estante tre okupita en sia profesio li volas dediĉi sian tempon liberan al la gazeto kaj al finiĝo de siaj komencitaj laboroj. La kunveno do akceptas la rezignacion, kaj elektas S-ron Ginz kiel ĝeneralan sekretario. La danko letero de D-ro Kamaryt estas legata kaj estos publikigita.

Al

redakcio de „Ligilo“

Prostějov.

Nia komitato legis en sia kunveno la 15-an de decembro 1931 la artikolon „El oriento lumo“ de Užhorodano, publikigitan en „Ligilo“ nro 12 kaj deklaras:

„Havante en la manoj la raportojn de s-ro Scherer kaj de la aranĝintoj en Košice, la komitato kun bedaŭro konstatas, ke la enhavo de la artikolo ne respondas la veron.

La komitato aldonas, ke ĈAE (en interkonsento kun GEL) kun grandaj oferoj organizis kaj per financa garantio ebligis la vojaĝon de s-ro Scherer en Ĉeĥoslovaka respubliko kaj sekve ankaŭ la paroladon en Košice.

Al la kunlaborantoj, kiuj en 19 lokoj de la respubliko per sia oferema laboro helpis al la sukceso de la tuta entrepreno, la komitato esprimas sinceran dankon, kaj petas ilin daŭrigi sian seriozan kunlaboradon kun ĈAE, ne atentante senbazajn kritikojn.“

Ni estos al vi dankaj, se vi bonvolos publikigi la suprajn liniojn en via venonta numero.

Kun samideana salupo

Ĉeĥoslovaka Asocio Esperantista  
O. Ginz,  
ĝenerala sekretario.

## MOVADO EN ĈEĤOSLOVAKIO

### Policistoj.

Polica grupo esperantista en Praha kunvenas ĉiun ĵaŭdon de 16.30 ĝis 18.30 en ejo de Polica Direkcio en Praha. Prezidanto estas S-ro V. Haissinger, ĉefinspektoro, sekr. S-ro Vlasák Tomáš.

### Laboristoj.

Laborista Societo en Praha aranĝas ankaŭ post la libertempo siajn programajn kunvenojn ĉiun unuan mardon en la monato, en Sindikata domo (Odborový dům), Pernštýn 11. — Laborista Societo en Plzeň festis 20 jarojn de sia ekzisto. Vidu pri tio sub Plzeň. — Laborista Ligo Esp. en ĈSR. eldonas monatan ciklostilitan, 2 paĝan bultenon, kiun redaktas Karel Štekl, Plzeň 9, Tichá 5.

### RADIO.

Moravská Ostrava. La 14. XII. 1931 esperantlingva prelego de s-ro Fr. Křetínský pri „Esperanto en servo de ĉeĥoslovaka turismo.“

Bratislava 30. X. 1931.

Al sinjoro

Rudolf Hromada,  
ĝenerala sekretario de Ĉeĥoslovaka Asocio  
Esperantista

en Praha.

### Tre ŝafata samideano kaj amiko,

mi tre bedaŭras Vian decidon anoncitan al mi per Via letero el 26. X., ke Vi rezignas je funkcio de ĝenerala sekretario de nia Asocio, kiun Vi plenumas kun tiom da talento, sperto, kaj laboremo depost la 2-a de februaro 1920. Dum la longaj 12 jaroj, kiuj tamen pasis tiom rapide, mi havis okazon resti en daŭra kontakto kun Vi kaj Via laboro. Estis epizodoj gajaj, estis epizodoj malĝojaj, kiujn ni travivadis. Sed estis momentoj ne maloftaj, kiuj estis kortuŝaj, kiam mi admiris en Via laborado poresperanta la specon de moderna heroeco karakterizatan per persisto en la laboro simple pro tiu kaŭzo, ke ĝi laŭ nia opinio estas farinda.

Mi neniam parolis al vi pri tiuj miaj sentoj. Sed permesu, ke ĉe tiu ĉi okazo mi povu diri tion kaj ke mi esprimu mian ĝojon pro tio, ke Vi restas kaj daŭre restos nia komitata kunlaboranto.

En amika respekto

Dr. Stan. Kamaryt,  
prezidanto de Ĉeĥoslovaka  
Asocio Esperantista.

Bratislava. La 6. I. 1932 esperantlingva prelego de s-ro Wanitsek pri „Historio de slovaka popolo“ (II.-a parto).

Bratislava: Esperantlingvaj prelegoj de s-ro E. Wanitsek: Sonoriloj de Podolie 3. VII. kaj Skizoj el historio de slovaka popolo I. 14. XII. 1931.

Praha. La 15. XII. 1931 estis laŭ iniciato de nia Asocio disaŭdigata samtempe por ĉiuj ĉeĥoslovakaj stacioj la esperantista himno el la Bakule-disko pro okazo de la Zamenhofa-tago.

Praha. Prof. Novljan el Zagreb, kiu faras en Praha serion da paroladoj pri Jugoslavio, tuŝas dum siaj interesaj prelegoj ripete la problemon de internacia lingvo. Li aludas la malfacilaĵojn, kiujn kaŭzas al la slavoj perfekta posedo de alia slava lingvo kaj konkludas, ke povas helpi sole internacia lingvo en interkompreniĝado de ĉeĥoslovakoj kun la frataj nacioj sudslavaj.

\* \* \*

Stacidomaj tabuloj. En stacidomo de Brno, apud la elirejo, estas depost oktobro 1931 surmetita nova granda, bele pentrita tabulo kun informoj pri la Esperantista klubo, Katolika Grupo, Societo de Germanlingvaj espistoj, adresoj de la klubaj funkciuloj kaj de UEA delegitoj. La tabulo pro sia grandeco kaj aranĝo devas vekti intereson de multaj preterpasantoj. La adresoj estas sur slipoj forigeblaj por ebligi ŝanĝon.

\* \* \*

#### MUDr. A. Bischofzky,

nia eminenta samideano, persista propagandisto kaj sukcesa esperantlingva verkisto, prezidanto de societo de germanlingvaj samideanoj en Praha Verda stelo, estis 16. XI. 1931 sesdekjara. Ni uzas tiun okazon por gratuli lin sincere pro lia multjara laboro.

Mladá Boleslav. La 15. Decembro la loka klubo aranĝis okaze de la kursfiniĝo amuzan vesperon. Prezidis profesoro Kožený. S-ro Pytloun, kiu partoprenis kun kelkaj samideanoj el Bakov, parolis per kelkaj belaj vortoj pri Zamenhof kaj rekomendis al ĉiu aĉeti en la memortago de la naskiĝo almenaŭ unu libron. D-ro Marek en esperanto dankis al la kursestro S-ro Moucha por la senprofita penado kaj la bona rezulto. Ĉiujn surprizis, ke post tiel mallonga tempo oni povas tiom multe lerni. S-ro Šilhart el Nymburk ludis citeron kaj helpis al la sukceso de la vespero. Multaj samideanoj recitis esp. poemojn.

Stonava. Dimanĉe la 13. Decembro 1931 okazis ĉi tie labora kunsido de Regiona ligo sitezia, partoprenis 22. p. el 11 lokoj. Okaze de la dekjara ekzisto de la loka grupo oni gratulis al ĝia laboro, tiom pli laŭdinda, ke la klubo konsistas el neriĉaj laboristoj. Oni dankis al S-ro Křeinský en Radvanice, kiu energie kaj diligente zorgis pri la sukceso de Scherer-paroladoj en Moravská Ostrava. S-ro Balický raportis pri la historio de la loka klubo.

Přerov. La 7. Januaro 1932 komencis ĉi tie kurso por komencantoj; aliĝis 42 personoj, inter ili unu instruisto, unu faka instruistino, unu profesoro-inĝeniero de agronomia lernejo, 3 oficiistoj, la ceteraj estas gestudentoj de la gimnazio, de la komerca, industria, virinfaka kaj burĝaj lernejoj. La kurso okazas ĉiun lundon kaj jaŭdon de la 19-20 horo en la burĝa lernejo „Karolina Světlá“; instruas samideanino Grauerová.

Holešov. En novembro profesoro Růžička kaj S-ro Loveček invitis S-ron direktoron Krump-

holc por paroli pri esperanto. Li venis kaj parolis antaŭ 40 personoj. Sekvis kurso, en kiu 14 p. instruas S-ro Loveček, ĉiumarde du horojn en ejo de la knabina lernejo.

Karvinná. Laŭ decido de la ĝenerala kunveno de la „Mem-eduka rondeto“ (Kólko Samokształcenia) de la „Macierz Szkolna“ (pola lerneja societo) oni komencis la 4-an de januaro trimonatan kurson de esperanto por komencantoj. Partoprenas pli ol 50 personoj, plejparte junularo. La kurson gvidas s-ro R. Z. Kobiela, konsuleja oficisto el Mor. Ostrava.

Liberec. Kiel kutime ankaŭ en aŭtuna foiro 1931 esp-o estis propagandata. En unu el ĉefaj haloj estis stando kun esperantlingvaj afiŝoj kunigitaj en kvar grupoj laŭ ilia enhavo. Ekster pavilonoj staris horloĝo montranta 5 minutojn antaŭ la dekdua kun alvoko: Por ĉiu estas eble ellerni esp-on ankoraŭ en tiu ĉi momento!

Karvinná. Je la iniciato de la „Mem-eduka rondeto“ ĉe la pola lerneja societo okazos la 21. de februaro je la 14 1/2 posttagmeze en la laborista domo, Karvina-Hohenegger publika diskutado pri lingvo internacia. Ĉar la ĉiftiea publiko multe interesiĝas pri tiu-ĉi problemo, estas dezirinde, ke la proksimaj esperanto-societoj (polaj, bohemiaj kaj germanaj) delegu lertajn propagandistojn, por ke esperanto venku en la diskutado. Esperantistoj, aperu multnombre en Karvinna la 21. de februaro!

Bor. La loka grupo decidis en sia ĝenerala kunveno 7. IX. 1931 rememorigi 25 jarojn de sia ekzisto per aranĝo de Esperanto-tago en printempo 1932.

Ústí n. L. La unuiĝo de profesiaj ŝoferoj (loka grupo de Internacia Transportista Federacio kun sidejo en Amsterdam) petis sen ia ajn esperantista iniciato la Esp-o-grupon sendi al ĝi informanton pri esperanto. Ĝi okazis en membra kunveno de ŝoferoj 4. V. 1931, en kiu post enkondukaj vortoj de oficisto de la I. T. F. s-ro Werner parolis pri esperanto kaj ĝia signifo samideano Fischer.

Orlová. Kurso publika komencis la 15. -an de novembro 1931, en knaba lernejo por 8. p.

Kcmárno. S-ro Josef Sprušanský gvidas kurson por komencantoj dum monatoj oktobro 1931 ĝis februaro 1932 plendante pro diversaj malfacilaĵoj de li venkotaj kaj venkataj.

Stenava. La loka grupo festis dimanĉe la 10-an de decembro 1931 la 10-an datrevenon de sia fondiĝo.

Uherské Hrad.šfě. Preleĝo pri la Krakova kongreso kaj pri la dumkongresaj kunvenoj de TAGE estis farita de s-ro Dolfa Bartošik por

kunveno de la instruista societo Komenský. La kunvenon ĉeestis 60 ĝeinstruistoj, kiuj vidigis viflan intereson por nia movado.

**Horní Litvínov.** Ekspozicieto propaganda estis aranĝita la 18. X. 31. de s-ro Slanina. La kurso ĝin sekvinta estis malfermita de la vicurbestro.

**Prostějov.** Kurson por militaj aviadistoj aranĝitan kun permeso de la soldataj aŭtoritatoj dum aŭtuno 1931 de s-ro St. Jeřábek partoprenis 60 aviadistoj.

**Kopřivnice.** Dum aŭtuno kaj vintro 1931-2 okazas kurso por 22 p.

**Brno.** La katolika klubo partoprenis 8. XII. korporacie kun flago la solenan meson por festi la inaŭguron de nova episkopo de ilia diocezo.

**Moravská Ostrava.** La kurso en Radvanice gvidata de s-ro Křetínský komencita la 4-an de oktobro kun 45 p. finis la 20 -an de decembro kun 30 p. Ĉiuj sekvas novan kurson por progresintoj depost 17 -a de januaro 1932. Dum la monatoj novembro kaj decembro s-ro Křetínský disvendis 150 lernolibrojn.

#### **S-ro Scherer en Praha 250 personoj.**

La 4. XI. en la prelega salono de la Urba Biblioteko S-ro Scherer parolis pri Japanujo, Indociĉio kaj Bali-insulo. Lerte tradukis S-ro Echtner. La parolado tre plaĉis kaj ĉe multaj personoj vekis intereson pri espo. La paroladon aranĝis Esp. Klubo de Praha.

#### **S-ro Scherer en Kladno 200 personoj.**

La parolado okazis sabate la 7. XI. en la granda salono de hotelo „Živnodům“, aranĝita de „Živnostenská akademie“ kunlabore kun Esp. Klubo. La paroladon pri Hollywood, Suda Kalifornio, Japanujo kaj insulo Bali vizitis preskaŭ 200 personoj (neatendita nombro, ĉar nia publiko kutime ne tro ŝatas paroladojn). La vizitintoj scivole rigardis la belajn lumbildojn de malproksimaj landoj kaj kun intereso aŭskultis la aĝrablan sonaron de esperanto, mirante samtempe, ke oni kapablas tiom flue paroli artefaritan lingvon. Kvankam la parolado daŭris ĝis noktomezo, neniuj forlasis la salomon antaŭ la fino, post kiu la entuziasmigita publiko rekompencis la eminentan gaston per longdaŭra aplaŭdo.

Okaze de tiu parolado, la Klubo aranĝis en la apuda ĉambro esperanto-ekspozicion, kiu vekis grandan intereson de la vizitantoj kaj admiron pro la jama vasta uzado de E. en multaj fakoj.

VI. Br.

#### **S-ro Scherer en Brno 220 personoj.**

En Brno S-ro Scherer havis du paroladojn. La unuan, la 13. Novembro 1931, (Vojaĝo tra Hindio, lando de Gandhi), aranĝis la popolkleriga societo Městský osvětový sbor en bela Halo de Hus. Pro nesufiĉa reklamo flanke de tiu ĉi societo, kaj parte ankaŭ pro la terura neĝpluva vetero ĉeestis la paroladon sole 53 personoj.

La alia parolado (Tra Japanio kaj Ĉinio), estis aranĝita de la Esp. Klubo sabate la 14. Novembro kaj partoprenis ĝin 171 personoj. Ĉeestis redaktoroj de Lidové Noviny, Moravské Noviny, kaj Nový Lid. La redakcio de Lidové Noviny transdonis al S-ro Scherer la libron de Jan Welzl: Tridek jarojn en la ora nordo. Antaŭ la parolado estis ludita „La Espero“ (Bakule-disko).

La ambaŭ paroladojn bone kaj lerte tradukis ĉefe S-ro Samla-Strejček, S-ro Scherer estis gasto en la familio de S-ro Baďura, prez de E. Kl. Li vizitis 3 redakciojn (supre nomitajn).

La diapozitivaj ĝenerale tre plaĉis, la paroladoj estis tre interesaj kaj bonhumoraj.

#### **S-ro Scherer en Prostějov 350 personoj.**

La parolado pri Japanio, Ĉinio, Indociĉio, kun 185 bildoj okazis dimanĉe la 15. XI. je la 10 h. en kino-teatro Atlas antaŭ 350 personoj

Aranĝis Esperantista Klubo kun Asocio de privatoficistoj. — Prostějov havas 34.000 loĝ. do la sukceso kontentiga. Posttagmeze je la 15.30 S-ro Scherer parolis en amika rondo de esperantistoj pri siaj spertoj dum la vojaĝo.

F. H.

#### **S-ro Scherer en Olomouc 1.300 personoj.**

S-ro Scherer parolis la 16. XI. je la 11 h germane en kino Edison antaŭ 600 germanaj gestudantoj pri Japanujo kaj Ĉinujo kaj je la 20 h esperante en hotelo Národní dům antaŭ 700 pers. pri Japanujo. Ĉinujo kaj Hindujo, kiu paroladon tradukis ĉefe s-ro Neuzil. La propagandan laboron preparis UEA membroj Řebíček, Mrázková K. Kudela. Ambaŭ paroladoj tre bone plaĉis pro la tre interesa enhavo, sprita k. bonhumora parolmaniero. S-ro Scherer estis akceptita oficiale de urbestro Dro Fischer, de Dro Svěrák en la Komerca Ĉambro, — havis konferencon kun la lokaj ĵurnalistoj, vizitis la esp. lernejon de s-ro Neuzil k. estis ankaŭ bonvenigita de 4jara Luĉjo Neoral, parolanta nian lingvon jam depost 9 monatoj. Li estas nepo de UEA. delegito Kudela. Lokaj gazetoj

raportis favore. Por la trioble pli granda nombro de ĉefaj gestudentoj ne estis eble okazigi la trian projektitan paroladon, por ke Esp. ne tro sukcesu. Ant. Kudela.

#### S-ro Scherer en Moravská Ostrava.

**Rekordo: en du tagoj 5 paroladoj al 1100 p. Inter ili 700 studentoj.**

S-ro Frant. Křetínský, helpata de S-ro Slaný kaj Baštl sukcesis tion ĉi en tre mallonga tempo. La 17. Novembro S-ro Scherer venis je la 9.28 h. kaj jam post du horoj li parolis en Instruista Pedagogio en Sl. Ostrava al 250 studentoj, estontaj instruistoj. (Japanio kaj Bali-insulo). Al la kurso, permesita de la direktoro, aliĝis 30 lernantoj, gvidas S-ro Gadula el Vítkovice.

Vespere okazis publika parolado en Domo de Arto al 350 p., inter ili preskaŭ duono esperantistoj eĉ el malproksimaj lokoj.

La sekvintan tagon je la 9-a horo matene S-ro Scherer parolis en germana burĝa lernejo al 180 infanoj pri Japanio kaj Siam. Je la 12-a horo okazis la kvara parolado por ĉefa knabina gimnazio al 250 studentinoj. Kaj fine vespere okazis en la Domo de Arto parolado por germana publiko (90 p.). Post la parolado ni renkontiĝis en hotelo Imperial, kie S-ro Sch. rakontis al ni siajn vojaĝajn travivaĵojn.

Dum tiuj ĉi du tagoj ni varbis multajn personojn por nia afero. S-ro Křetínský faris 50 afiŝojn, 200 esp. invitilojn, kiujn dissendis REL kaj 1000 ĉefajn invitilojn. Plie dum kelkaj tagoj 6 kinoteatroj projekciis la informon pri la paroladoj. S-ron Scherer afable gastigis S-ino Beroch. La tri paroladojn por ĉefaj aŭskultantoj tradukis flue kaj lerte S-ro Hladký el Karvinná.

#### S-ro Scherer en Košice.

**Alia rekordo: 2 paroladoj por 1.300 personoj.**

La unuan paroladon aŭskultis 750 studentoj kaj profesoroj, la alian 550 personoj. Tradukis S-ro Josef Friedrich. Krom tio okazis amika kunveno kun 24 samideanoj de Košice, kaj 4 el Prešov, Čop kaj Užhorod. Per Radio-Košice estis dissendata la interparolado de S-ro Scherer kun UEA delegito S-ro Friedrich pri vojaĝaj impresoj el Ĉeĥoslovakio, kun ĉefa traduko. —

#### S-ro Scherer en Bratislava 400 personoj.

La paroladon en Speĝula salono la 23 XI. partoprenis 400 p. Tradukon prizorgis prof. Vlad Jukl en slovakian lingvon. Generale bone

efikis la bona humoro kaj la flua esperanto. La parolado pri Japanio, kaj Indoĉinio daŭris 2 horojn, aranĝis ĝin Esperanto-Klubo kaj kleriga asocio Osvetový sváz. Post la parolado okazis samideana kunveno, dum kiu S-ro Scherer nin informis pri la stato de la movado en la vizititaj landoj kaj akcentis neceson subteni ĈAE kaj GEL. Li vizitis ankaŭ la porfremdulan asocion. Sian paroladon li finis per adiaŭa saluto al Ĉeĥoslovakio. La 24. XI. li forveturis al Wien.

#### L. C. K.

dankis al nia ĝenerala sekretario S-ro Otto Ginz en la letero de la 7. Januaro 1932:

„Ni jam esprimis al vi nian rekonon pro la valora subteno koncerne la teknikan aranĝon de ĉio. Ni deziras esprimi ĉi tie apartan dankon al vi, sinjoro Ginz, kiu kun tiom da energio, persisto, metodo kaj ordo, okupis vin pri la detaloj rilate al la ĉeĥoslovaka parto de la vojaĝo. Nia sperto ne estas la unua kun vi, sed ĝi meritas apartan mencion, ĉar ĝi facile esperigas nin pri samsukcesa laboro en similaj entreprenadoj estonte.

Kun nia denova danko, ankaŭ al ĉiuj, kiuj iel kunagadis en tio“.

#### Postparolo.

Krom la Dana filmo en la komenco de la jaro la vojaĝo de S-ro Scherer estis la plej granda propaĝanda atako de nia Asocio kaj ĝiaj kunlaborantoj. Miloj da personoj legis pri esperanto kaj aŭdis paroli en ĝi, aŭdis pri spertoj de ĵurnalisto uzanta esperanton dum vojaĝo ĉirkaŭ la tuta terĝlobo. Energio de multaj samideanoj streĉiĝis kaj pruviĝis, eĉ novaj talentoj montriĝis. Jamaj esperantistoj trovis refreŝiĝon kaj kuraĝigon por plua kredo kaj laboro, novaj homoj estis varbitaj. Estis tre saĝa la ideo de ICK aranĝi ĉi tiun vojaĝon kaj ni povas nur danki al ICK pro ĝi. Kaj same danki al ĈAE, al ĝia nuna komitato kaj ĝia nova ĝenerala sekretario S-ro Ginz, kaj — kompreneble — al la granda nombro de niaj samideanoj, kiuj ne timante la elspezon de tempo kaj energio, sindone ekagis kaj — sukcesis. Kun granda plezuro ni publikigas informon pri tio en la lokoj, el kiuj ni ĝin ricevis. Al S-ro Scherer ni deziras, ke la spertoj, kiujn li akiris dum sia vojaĝo, lin firmigu en plua laboro por nia afero.

R. H.

---

**OBNOVTE PŘEDPLATNÉ**

---

## ĈSL. GAZETARO KAJ ESP-O.

## Redakcia.

Bildo de Scherer kun esperantistoj de Praha estas en *Rozkvět* nro 47.

En *Slovanský juh* Nové Zámky la 21. XI. ni legis kelkajn interesajn notojn pri la esperantomovado.

Tuta kolono pri nia lingvo aperas de tempo al tempo en *Sřredoĉeská obrana* Pečky.

Vizito al Gandhi, traduko de O. Ginz el ĝeneva Esperanto estis en *Národní osvobození* 22. XI.

Deveno de virino, traduko de J. Šupichová, aperis en *Pravda* Vídeň 12. XI.

*Mladý svět* 17. XI. havis artikolon J. A. Komenský kaj helpa lingvo de J. Šupichová.

400 jara jubileo de Jan Kochanowski historian skizon verkitan de Jan Medrkwicz tradukis laŭ Heroldo de Esperanto F. Uhrová-Křivancová kaj ĝin represis *Prácheňské noviny* Pisek 25. XI.

Kreinto de esperanto dro L. L. Zamenhof pri homaraneco kaj religio. El Originala verkaro tradukis T. Machala. Aperis en *Bratřtvo*, nro 3/1931.

Pri ĉiutaga vivo de afrika farmisto el nro 7. - XII., de la *Progreso* estis tradukita de Karel Dušátko, Sázava kaj publikigita en *Pražská zahradnická bursa* 10. XII.

En nia nordo estas la gazeto *Český sever* Liberec, kiu ofte raportas pri novaĵoj el nia movado. Ni havas ĵus la numeron de la 5. XII. kun interesaj notoj pri nia afero.

„Metodoj por informado kaj gvidado de fremduloj“ de dro A. Piřlík, en septembra kajero *Věstník ministerstva obchodu*, estas traduko de lia parolado okazinta la 5. VIII. 1931 dum la Somera universitato en Kraków.

Monata organo por vivo de junularo *Slunce* portas esperantan tradukon de sia titolo La suno. Ĉiu numero havas ankaŭ esperantan tabelon de la enhavo.

Alvoko de J. Šupichová „Lernu esperanton!“ aperis en la porinfana gazeto *Mladé snahy* Kvíčovice 11. XII.

La regiono de Pisek estas regule informata pri nia laboro. *Prácheňské noviny*, enhavas ofte sciigojn pri nia afero, kiuj certe vekas intereso de la legantaro.

La princlandon *Liechtenstein* kaj la aperon de novaj esperantaj poŝtaĵoj en tiu lando atentis jam kelkaj gazetoj. Ni vidis ĵus *Národní Politika*, 2. XII., *Stráž Třebíč* 3. XII., kaj *Mladoboleslavské listy* 12. XII. Jam antaŭe *Prácheňské noviny* 18. XI.

O. G.

Finante la XIII. jarkolekton de *La Progreso* ni kore dankas al ĉiuj niaj kunlaborantoj, abonantoj kaj entute al ĉiuj amikoj, kiuj iel ajn subtenis nin dum la lasta jaro, kaj tiel helpis al la restarigo de la gazeto.

En la antaŭaj tri jaroj la gazeto ne povis aperradi regule. Tion la plejparto de la ĉsl. esperantistoj komprenis kaj pardonis. En la lasta jaro ni sukcesis venki la grandan parton de la malfacilaĵoj, precipe la plej gravan — la nesufiĉan precizecon de certaj personoj koncerne pagadon de la abono. Tio ebligis al ni multe pli frue fini la jarkolekton kaj komenci la movan.

La 11-a nro de la ĵus finita jarkolekto aperis en marto, la lasta numero, tiu ĉi, estas preta en januaro. La tutan jarkolekton ni do sukcesis eldoni en 10 monatoj. Tio estas grava plibonigo, kiu donas al ni la esperon, ke dum la jaro 1932 niaj abonantoj ricevos la *Progreson* en intervaloj ankoraŭ pli regulaj.

Koncerne la regulecon pluraj amikoj skribis al ni, ke ili pli ŝatas nian regulon doni ĉiam altvaloran legajon ol ili ŝatus regulan liveradon de iu gazeto, kiu ne povus ilin kontentigi laŭ tiu ĉi vidpunkto. Kvankam ni ankaŭ konsentas, ke esperantaj gazetoj ne estas ĵurnaloj, kiuj dependas de rapida kaj tuja informado, ofte senkvalita, tamen ni klopodos, ke niaj abonantoj havu sian ekzempleron regule ĉiumonate.

Ni petas ankaŭ atenti pluan plibonigon en tio, ke dum la tuta jaro ni eldonis sole du du-numerojn, la 1—2 (24paĝan) kaj 9—10 (20 paĝan). Kvankam la nombro de la jarkolektaĵpaĝoj ne estis per tio malgrandigita (116 paĝoj kun la Tabelo de la enhavo), tamen ni evitos tion laŭeble.

Multan plaĉon trovas la plibonigo enkondukiĝanta dum la jaro kaj konsistanta en du novaĵrubrikoj: El Esperanto-Mondo (koncizaj informoj pri ĉio nova kaj interesa en la movado eksterlanda) kaj *Něco pro samouky a kursy*. Ni daŭrigos ilin ankaŭ en 1932.

La terura ekonomia krizo, kiu nun regas ĉie necesigos streĉon de fortoj de ni ĉiuj por konservi kaj plu vivteni niajn esperantajn organizaĵojn kaj gazetojn. Al multaj senlaboruloj ni liveris *La Progreson* senpage, ĉar en siaj bonaj tempoj ili estis bonaj amikoj de nia afero. Ni daŭrigos tion, ĉar ankaŭ ni ne laboras por profito momenta de iu ajn persono, sed por bono de la movado.

Ni esperas, ke ne nur ĉiuj ĝisnunaj abonantoj kapablos aboni, sed ke ili varbos pluajn. Ni petas ilin pri tio kaj dankas pro ilia fideleco jam antaŭe.

Redakcio.

Novinová sazba povolena ředitelstvím pošt a telegrafů v Praze čís. 258.888/VI-23.

Eldonanto kaj responda redaktoro RUDOLF HROMADA. - Presis JAN MINAŘ NYMBURK.